



Jura Semajno

Semajna bulteno de Internacia Jurista Esperanto-Asocio

Januaro: 1 2023

LA ĈINA REGISTRARO RAJTIGAS AL HONGKONGO VETOI EKSTERLANDAJN ADVOKATOJN

La pasintan sabaton la ĉina registaro rajtigis al guberniestro de Hongkongo, S-ro John Lee, malpermesi la laboron de eksterlandaj advokatoj en tiuj kazoj kiuj povas endanĝerigi la nacian sekurecon.

Ĉi tiu decido estas alprenita post prokrastigo de jura proceso en Hongkongo kontraŭ Jimmy Lai, entreprenisto por amas-komunikiloj. La prokrastigo ŝuldiĝis al la fakto, ke S-ro Lee petis la intervenon de la Nacia Popola Asembleo de Ĉinio, kiam la Justica Departamento malpermesis al brita advokato S-ro Timothy Owen gvidi la defendon de S-ro Lai.

Kelkaj kontraŭaj opinioj al la decido de la ĉina registaro asertas, ke la interveno de Pekino en ĉi tiu jura proceso subfosas la juran sendependon de Hongkongo rilate Ĉinion, ĉefe pro la fakto, ke temas pri ofta afero la partopreno de eksterlandaj advokatoj en juraj procesoj okazantaj en Hongkongo, eksa brita kolonio kaj nuntempe speciala administra regiono de Ĉina Popola Respubliko. S-ro Lai restas arestita de antaŭ du jaroj, la



prokuroro postulas por li dumvivan enkarcerigon, pro delikto kontraŭ la nacia sekureco. La amas-komunikila entreprenisto, fondinto de la ĵurnalo “*Appel Daily*” kaj konsiderata kiel kontraŭulo al la ĉina registaro, estas akuzita konspiri, helpita de eksterlandaj grupoj, kontraŭ la ĉina prezidanto Xi Jinping kaj la Komunisma Partio de Ĉinio.

Guberniestro Lee deklaris, ke la decido vetoi eksterlandajn advokatojn, nur rilatas al tiuj aferoj kiuj povas endanĝerigi la nacian sekurecon, “*rilate aliajn aferojn ili estas bonvenaj*”, li deklaris. Post la retransdono de suvereneco de la teritorio de Hongkongo al Ĉinio en la jaro 1997, la centra ĉina registaro adoptis la principon “*unu lando, du sistemoj*”, pro tio Hongkongo ĝuas aŭtonomecon sur kelkaj agad-kampoj.

Vorto de la Semajno

Ĉambro:

Ejo, en kiu regule kunvenas por interkonsiliĝi diversaj institucioj. Ĉi tiu vorto ankaŭ povas montri tiujn instituciojn mem.

Ekzemple: supera, malsupera ĉambro de parlamento; ĉambro de lordoj; komerca ĉambro; ĉambro de deputitoj ktp.

En multaj demokratiaj ŝtatoj ekzistas duĉambra parlamenta sistemo.



Ĉambro de Lordoj en Britio

Feliĉan Novan Jaron 2023

Internacia Jurista Esperanto-Asocio deziras al sia membraro, kunlaborantoj kaj simpatiantoj feliĉan kaj fruktodonan novan jaron. 2023 havigu al vi ĉiujn viajn plej ŝatatajn dezirojn kaj profesiajn sukcesojn.

